ISSN 2072-5825

# Espero Katolika

**FELIĈAN PASKON EN KRISTO RESURECTINTA!**



Numero 4-6-2021

Aprilo-Junio 2021



Dimanĉe la 21an de marto 2021, je la horo 20.30, post longdaŭra batalo kontraŭ kancero, forpasis frato
**D-ro Antonio De Salvo,**
78-jaraĝa, iama prezidanto de IKUE, kolono de la E-movado ne nur itala.
**Ripozon eternan donu al frato Antonio, Sinjoro, kaj la senfina lumo lumu al li, li ripozu en paco. Amen.**

JARKOLEKTO 118 - N. 1197-1199 - Aprilo/Junio 2021

***Sur la kovrilo:*** Howard David Johnson: Resurekto de Jesuo Kristo.

## ENHAVO


| | |
|---|---|
| LA PAPO FRANCISKO EN IRAKO | 23 |
| LA PREĜO-SEMAJNO POR UNUECO DE LA KRISTANOJ | 26 |
| ĈU NI IOM RIDU? | 27 |
| LA KATEĤISMO DE LA KATOLIKA EKLEZIO - KOMPENDIO | 28 |
| HUMURO DE MAKSO (sac. Maxmilián Jaroslav Kašparů) | 29 |
| MI ESTAS DAŬRE KUN VI | 30 |
| LA MIRAKLO ĈE LA RIVERO SEJNO | 33 |
| MENSOGO POST MENSOGO | 34 |
| DIO ANKAŬ AL VI DIRAS: ’MI ESTAS KUN VI, MI VIN NE FORGESIS!‘ | 36 |
| ROZARIO - KUNPREĜADO PER ZOOM | 36 |
| ĈU JESUO ALPORTIS „PARADIZON SUR LA TERON“? | 37 |
| KIAM INTELEKTO RENKONTIĜAS KUN KREDO | 38 |



**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto “ikue-v” * Banko:** “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E**.
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Pavol Petrík - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli,Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# LA PAPO FRANCISKO EN IRAKO

***La papo Francisko komencis la 5-an de marto 2021 kvartagan “pilgrimon de la paco kaj frateco” al Irako. Post alveno al Bagdado la papo renkontiĝis kun ŝtataj aŭtoritatuloj kaj kun diplomataro en palaco de la ŝtatprezidento en Bagdado. Poste li partoprenis renkontiĝon kun ekleziaj reprezentantoj en siria-katolika katedralo de la Virgulino Maria la Patrino de la Savo. La 33-a internacia vojaĝo de la pontifikado de la papo Francisko okazis sub la moto “Ĉiuj vi estas fratoj”.***

## HOMILIO DE LA PAPO EN IRBILO: SAĜECO DE LA KRUCO



*La papon bonvenigis premiero Mustafa Kázimí*

La eklezio en Irako vivas kaj ĝi heroldas saĝecon de la kruco, emfazis Francisko dum la prediko sur stadiono de Frans Harri en Irbilo. Ĝuste tion li indikis kiel unu el motivoj, kial li decidis pri tiu ĉi vojaĝo. Jen la tuta homilio de la papo:

La sankta Paŭlo memorigas al ni, ke „por tiuj, kiuj estas invititaj... estas Kristo Dia potenco kaj Dia saĝeco“ *(1Kor 1,24)*. Jesuo evidentigis tiujn ĉi potencon kaj saĝecon antaŭ ĉio per mizerikordo kaj pardono. Li ne volis ilin perforte demonstri aŭ entrudigi sian voĉon desupre, eĉ ne per longaj predikoj aŭ per elmontrado de sia neatingebla sciado. Li tiel faris per donaco de sia vivo surkruce. Li malkaŝis sian saĝecon kaj Dian potencon, kiam Li montris ĝisfine fidelecon de la Patra amo, fidelecon de Dio de Testamento, kiu elirigis sian popolon el sklaveco kaj kondukis ĝin laŭ vojo de libereco *(kp. Eli 20, 1-2)*.



*Antaŭ la komuna preĝo en Ūr*

Kiel facile estas enfali en insidon, kiu entrudigas al ni, ke ni devas al aliuloj montri, ke ni estas pli fortaj, ke ni estas pli saĝaj... *(kp. Eli 20,3-5)*. Sed fakte tio estas male, ni ĉiuj bezonas Dian potencon kaj saĝecon, kiu evidentiĝis en Jesuo surkruce. Li sur



*Kun ŝtatprezidento Barham Salih (foto Reuters)*

Kalvario oferis al la Patro vundojn, pere de kiuj ni estis resanigitaj *(kp. 1 Pet 2,24)*. Kiom da viaj gefratoj, geamikoj kaj kuncivitanoj ĉi tie en Irako portas vundojn pro milito kaj perforto, la vundojn videblajn kaj nevideblajn! Ni estas tentataj reagi al tiuj ĉi kaj pluaj dolorigaj realecoj per homa forto, per la homa saĝeco. Sed Jesuo montras al ni vojon de Dio, kiun Li mem iris kaj al kiu Li nin invitas por sekvado.



*La sankta meso sur stadiono en Irbíl, Kurdistano (foto Reuters)*

En la evangelio, kiun ni ĵus aŭskultis *(Joh 2, 13-25)* ni vidas, kiel Jesuo elpelis el jerusalema templo monŝanĝistojn kaj ĉiujn, kiuj tie aĉetis kaj vendis. Kial Jesuo tion faris? Li tion faris, ĉar Lin sendis lia Patro por purigi templon, ne nur la ŝtonan templon, sed ankaŭ la templon de nia koro. Jesuo ne toleris, ke la domo de Dio estu komercejo *(kp. Joh 2,16)* kaj Li faris geston tre fortan, tre provokecan. Kaj kiel signon de sia aŭtoritateco Li diras: „Detruu ĉi tiun sanktejon, kaj mi levos ĝin en la daŭro de tri tagoj“ *(Joh 2,19)*. Li parolis pri la templo de sia korpo. Jesuo Kristo, nur Li, povas nin purigi de malbonagoj, Li, kiu mortis kaj resurektis, Li, kiu estas Sinjoro!



*En Bagdado (foto Reuters)*

Karaj gefratoj, se ni iĝas viktimoj de specialaj interesoj, dispartigoj aŭ venĝo, Dio ne lasas nin morti en nia peko. Eĉ ne, kiam ni dorse nin turnas al Li, neniam Li nin lasas senprotekte al ni mem. Li serĉas nin, persekutas nin, por nin voki al pento kaj nin purigi. „Kiel Mi vivas, diras la Sinjoro, la Eternulo, Mi deziras ne la morton de malvirtulo, sed ke la malvirtulo deturnu sin de sia vojo kaj restu vivanta *(Jeĥ 33,11)*. La Sinjoro volas, ke ni estu savitaj kaj ke ni iĝu templo de lia amo, en frateco, en servo kaj en mizerikordo.

Jesuo nin ne nur purigas de niaj pekoj, sed donas al ni partoprenon en sia forto kaj sia saĝeco. Li liberigas de tia maniero de la kompreno de la kredo, familio kaj komuneco, kiu limigas kaj elvicigas, por ke ni povu konstrui eklezion kaj komunumon malfermitaj por ĉiuj kaj turnitaj al niaj plej bezonataj

gefratoj. Kaj samtempe nin fortigas, ke ni kapablu rezisti tentojn por serĉado de venĝo, kiu nin dronigas en senfina spiralo de revenĝo. En forto de la Sankta Spirito Li sendas nin, ne por fari prozelitismon, sed por labori kiel liaj disĉiploj – misiistoj, viroj kaj virinoj vokitaj atestadi, ke la Evangelio havas potencon ŝanĝi la vivon. La Resurektinto nin igas iloj de la Dia paco kaj de sia mizerikordo, esti paciencaj kaj kuraĝaj kreantoj de la nova socia ordo. Tiel pere de la forto de Kristo kaj de lia Spirito realiĝos tio, kion la apostolo Paŭlo profetis al Korintanoj: „La malsaĝeco de Dio estas pli saĝa ol homoj kaj la malforteco de Dio estas pli forta ol homoj“ *(1 Kor 1,25)*. La kristanaj komunumoj formiĝantaj el humilaj kaj simplaj homoj iĝas signoj de la Regno, kiu alvenas, la Regno de la amo, justeco kaj paco.


*Vizito de la sanktejo en Karakoš (foto A. Medichini)*

„Detruu ĉi tiun sanktejon, kaj mi levos ĝin en la daŭro de tri tagoj“ (Joh 2,19). Jesuo parolis pri la templo de sia korpo, kaj do ankaŭ pri sia eklezio. La Sinjoro promesas al ni, ke per forto de sia resurekto Li povas nin levi en ruinoj kaŭzitaj fare de maljustecoj, konfliktoj kaj malamo. Tio estas promeso, kiun ni festas en tiu ĉi Eŭkaristio. Per okuloj de la kredo ni rekonas ĉeeston de la krucumita kaj resurektinta Sinjoro inter ni, ni lernas akceptadi lian liberigantan saĝecon, ripozi en liaj vundoj kaj trovi resaniĝon kaj forton por servo de lia Regno, kiu eniras nian mondon. Per liaj vundoj ni estas resanigataj *(kp. 1 Pet 2,24)*, en liaj vundoj, karaj gefratoj, ni trovas balzamon de la mizerikorda amo, ĉar Li, Bona Samariano de la homaro, volas olei ĉiun vundon, resanigi ĉiun doloran rememoron kaj inspiri estontecon de la paco kaj frateco en tiu ĉi lando.


*Renkontiĝo kun ajatolaho Ali as-Sistani*

La eklezio en Irako, per Dia graco, faris kaj faras multon por heroldado de tiu ĉi mirinda saĝeco de la kruco, disvastigante mizerikordon kaj pardonon de Kristo, precipe rilate al tiuj plej bezonataj. Ankaŭ meze de la granda malriĉeco kaj malfacilaĵoj multaj el vi grandanime proponis konkretan helpon kaj solidarecon por malriĉuloj kaj suferantoj. Estas tio unu el motivoj, kiuj instigis min al tio, ke mi venu inter vin por danki vin kaj vin firmigi en la kredo kaj atestado. Hodiaŭ mi povas vidi kaj permane tuŝi la realon, ke la eklezio en Irako vivas kaj estas aktivanta en tiu ĉi sankta kaj fidela popolo.

Karaj gefratoj, mi konfidas vin, viajn familiojn kaj viajn komunumojn en patrinecan protekton de la Virgulino Maria, kiu aligis sin al suferado kaj morto de sia Filo kaj partoprenis lian resurekton. Ŝi propetu por ni kaj gvidu nin al Li, kiu estas Dia potenco kaj saĝeco.

*Vatican News*

# LA PREĜO-SEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

## „Restu en mia amo kaj vi donos multan frukton“ *(kp. Joh 15,5-9)*

***„Restu en mia amo kaj vi donos multan frukton“,*** estis moto de la nunjara preĝo-semajno okazinta ekde la 18-a de januaro kaj finita la 25-an de januaro je la festo de Konvertiĝo de la sankta Paŭlo. Kiel kutime la papo Francisko finigis la preĝo-semajnon dum ekumenaj vesproj en la baziliko super tombo de la Apostolo de la nacioj.

Moton el evangelio de la sankta Johano kaj tekstojn de la specialaj preĝoj nunjare preparis monaĥeja komunumo en Grandchamp en Svisujo. Tralumetas ĝin spirito de la komunumo, kiu sin dediĉas al preĝo, interpaciĝo kaj unueco de la eklezio eĉ de la tuta homa familio.

La komunumo de Grandchamp grupigas fratulinojn de diversaj eklezioj kaj landoj. Ĝi estiĝis en la unua duono de la dudeka jarcento kaj dekomence ĝi tenis ligojn kiel kun la komunumo de Taizé, tiel ankaŭ kun abbé Paul Couturier, la ŝlosila persono de historio de la Preĝo-semajno por unueco de la kristanoj. Hodiaŭ en la komunumo vivas ĉirkaŭ kvindek fratulinoj, kiuj devoligis sin serĉi vojon al repaciĝo inter la kristanoj transe de la tuta homfamilio eĉ de la tuta kreitaro.

### Komencoj de la ekumena ideo

La komencoj de la ekumena ideo datiĝas profunde en la pasinteco. Kiel ĝian antaŭkomencon oni opinias ekeston de la pentekosta movado en Skotlando en la jaro 1740, transiganta per siaj ligoj ankaŭ en Nordan Amerikon, kiu vokis pri la renovigo de la kredo turnigante sin kun alvoko de preĝo al ĉiuj eklezioj. Evangeliana predikanto Jonathan Edwards tial instigis al la tago de la preĝo kaj fasto por la unueco, por ke la eklezioj denove trovu komunan misian entuziasmon.

### Encikliko de la patriarko Joakimo la Tria

La pluan historian impulson de la ekumenismo oni trovas en rondletero de la konstantinopola patriarko Joakimo la Tria, kiu en la jaro 1902 publikigis „patriarkan kaj sinodan enciklikon“ adresitan al ĉiuj plej altrangaj reprezentantoj de lokaj ortodoksaj eklezioj, per kiu li komencis dialogon sur tutortodoksa nivelo malfermiĝinte pordegon al nova rilato al la okcidenta kristaneco. La patriarko parolis pri sopiro „atingi en la ortodoksa kredo unuecon de ĉiuj tiuj, kiuj kredas je Kristo“, alvokante al pripensiĝo de tio, kiel „rektigi vojon kondukantan al tiu ĉi celo“. Estas necese serĉi „lokojn, en kiuj ni renkontiĝadas“, aŭ tiujn, kiujn ni povas „reciproke transrigardi ĝis la tempo, ol la tuta verko de la unuiĝo estos finita“, skribis la patriarko Joakimo la Tria.

### La unua ekumena preĝo-semajno

Kelkajn jarojn pli poste, en la jaro 1908, tiam ankoraŭ pastoro de la episkopala eklezio Paul Wattson, kiu unu jaron post tio transiris en la katolikan eklezion, la unuan fojon solenis en la usona Graymoor „Oktagan preĝadon por la unueco“ ĝuste en la semajno de la 18-a ĝis la 25-a de januaro esprimante deziron, ke tio iĝu komuna tradicio.

### Renkontiĝo en Jerusalemo kaj Unitatis Redintegratio

La fundamenta ŝanĝo survoje al oficiala ekumenismo sendube estas la renkontiĝo de la papo Paŭlo la Sesa kun patriarko Athenagoro en la jaro 1964 en Jerusalemo, kie ili kune preĝis per vortoj de Jesuo „por ke ĉiuj estu unu” (Joh 17,21). Samjare aperis dekreto de la Dua Vatikana Koncilio pri ekumenismo, Unitatis Redintegratio, kiu emfazas, ke la preĝo estas animo de la ekumena movado kaj instigas al konservo de la preĝo-semajno.

### Datreveno de la Ekumena Ĉarto

Ni ankaŭ al ni memorigu, ke en la nunjara aprilo okazis la 20-a datreveno de la

Ekumena Ĉarto (Charta Oecumenica), la dokumento subskribita en Strasburgo per Konsilio de la Eŭropaj Episkoparaj Konferencoj kaj Konferenco de la Eŭropaj Eklezioj, en kiu estas prezentitaj direktivoj por kresko de la reciproka kunlaboro inter la kristanaj eklezioj de Eŭropo. ■

*Vatican News, 18.1.2021*




Ankaŭ la kristanaj esperantistoj aktive partoprenis en la preĝo-semajno kolektiĝinte ĉiutage vespere virtuale pere de ZOOM-platformo, por kune preĝi intence de la unuiĝo de la kristanoj. Tiucele estis sub gvido de la IKUE-prezidantino Marija Belošević kompilita kompendio kunlabore kun pli ol dudek geesperantistoj el kelkaj kontinentoj. La kompendion oni povas akiri el ttt-paĝoj de IKUE: www.ikue.org aŭ Fejsbuko alirebla ankaŭ el ttt-paĝoj de IKUE. ■

**PREĜOSEMAJNO**
**POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ**

**RESTADU EN MIA AMO**
**KAJ VI MULTE FRUKTODONOS**
**(Joh 15,5-9)**

18. - 25.01.2021

IKUE
Romo/Zagrebo, januaro 2021





## ĈU NI IOM RIDU?

Sinjoro preĝejservisto revenante el Lurdo travojaĝas landlimon kaj ĉe dogana kontrolo li devas malfermi valizujon de la aŭtomobilo. La doganisto el inter la valizoj eltiras grandan botelon da konjako. „Kaj kio estas tio?“, li demandas. „Tio estas lurda akvo,“ respondas la sakristiano. La doganisto nekredeme alflaras, kaj kiam li eksentas nefalsitan alkoholodoron, li hirtiĝante diras: „Ja tio estas aŭtenta konjako!“ Sed la sakristiano eĉ ne por momento ekhezitis kriante: „Miraklo, miraklo...!“

Dum la papa koncilio renkontiĝis ĉiuj kardinaloj kun la papo. La papo ekparolinte diris: „Estimataj kardinaloj, kontaktis min firmao de Coca-Cola proponante al nia eklezio grandan sponsoran donacon.“ La kardinaloj ekĝojegas. „Sed tio havas unu kondiĉon, ni devas ŝanĝi la vortojn »nian panon ĉiutagan« je »nian Coca-Cola-n ĉiutagan.« Kaj tial mi demandas: Kiam finiĝas niaj kontraktoj kun bakejoj?“

# LA KATEĤISMO DE LA KATOLIKA EKLEZIO
## KOMPENDIO

***Pastro Bernhard Eichkorn el Germanio, la vaste konata esperantisto precipe en la kristana medio, tradukis libron kun ĉ. 220 paĝoj, kies eldonon la emerita papo Bendikto la 16-a responsis. Temas pri la Kompendio de la Kateĥismo de la Katolika Eklezio. Ni permesu al la kara pastro Bernhard, ke li konigu nin kun tiu ĉi grava verko.***




La papo Johano Paŭlo la Dua petis, ke la Kompendion de la Kateĥismo de la Katolika Eklezio verku Joseph Ratzinger, la posta papo Benedikto la 16-a. La Kompendio estis vigle dezirata en oktobro 2002 de la partoprenantoj de la Internacia Kateĥumena Kongreso, kiuj tiamaniere esprimis bezonon larĝe disvastigitan en la eklezio. Johano Paŭlo la Dua ekkaptis tiun deziron kaj decidis en februaro 2003 ties efektivigon. Li konfidis la redaktadon al malgranda kardinala komisiono estrita de Jozefo kardinalo Ratzinger.

**Tiu ĉi Kompendio estas fidela kaj sekura resumo de la Kateĥismo de la Katolika Eklezio.** Ĝi entenas en konciza formo ĉiujn esencajn kaj bazajn elementojn de la eklezia kredo kaj prezentas tiel specon de *vademecum*, kiu ebligas al la homoj – ĉu kredantaj aŭ ne – superrigardon super la tuta panoramo de la katolika kredo. 26 koloraj bildoj el la riĉa trezoro de la katolika ikonografio kolorigas la libron por la kateĥizado. Ankaŭ la bildoj estas ja prediko de la evangelio, kion kardinalo Joseph Ratzinger tre akcentis.

Mi persone povas konfesi, ke dum mia plurjara traduk-laboro mi pli kaj pli entuziasmiĝis pri ĉi tiu Kompendio, kiu ofertas vere superrigardon de nia kredo. La Kompendio respegulas en sia konstruo, en sia enhavo kaj en sia lingvaĵo la grandan trezoron de la Kateĥismo de la Katolika Eklezio. Dum la tradukado mi komencis vere pli kaj pli fieri pri nia mirinda katolika kredo.

**Benedikto la 16-a konfidis ĉi tiun Kompendion al la tuta eklezio kaj al ĉiu unuopa kristano**, por ke en la tria jarmilo ili povu kun nova elano engaĝiĝi por la diskonigo de la evangelio kaj de la kredo-edukado. Li skribas en sia *Motu Proprio*: „Tiu ĉi renovigita engaĝiĝo devas ornami ĉiun eklezian komunumon kaj ĉiun Kristo-kredanton de ĉiu ajn aĝo kaj de ĉiu ajn popolo. Tiu ĉi Kompendio direktiĝas pro sia koncizeco, klareco kaj kompleteco ankaŭ al ĉiuj homoj, kiuj meze de distrita mondo kun multfacetaj mesaĝoj volas ekkoni la vojon de la vivo: la veron, kiun konfidis Dio al la eklezio de Sia Filo. **Legante la Kompendion, kiu estas ilo kun kompetenta signifo – danke al la speciala propeto de Maria, la plej sankta patrino de Kristo kaj de la eklezio – ĉiu**

**ekkonu kaj akceptu pli kaj pli la neelĉerpeblan belecon, unikecon kaj aktualecon de la bonega donaco, kiun donis Dio al la homaro: Sian unusolan Filon Jesuon Kriston, kiu „estas la vojo kaj la vero kaj la vivo“** (Joh 14,6).

Mi povas konfesi, ke ankaŭ mi persone ege riĉiĝis dum mia traduk-laboro pri mia kredo, kaj mi nun volas al ĉiuj Esperanton legokapablaj personoj rekomendi tiun ĉi libron.

Dum la traduka laboro pli kaj pli kreskis mia admiro de nia kredo, kiu al ni klarigas la mondon kaj montras al nia vivo la vojon. Kiaj blindaj kaj nesciaj estas la nekredantoj!

Ni kun pli da ĝojo iru renkonten al Dio, nia eterna Patro. Jesuo Kristo, nia Frato kaj Amiko, kies plej malnovan bildon vizaĝe ni vidas sur la titolpaĝo de la libro – Li portis por ni la krucon – ni ne estas senhelpaj. La morto ne estos la fino, sed la pordo al la eterna vivo, kie atendas nin la grandega ĝojo. Ek, ni kuniru kun Li!

*Sac. Bernhard Eichkorn*

Vi povas utiligi kristanan glosaron germanan-esperantan en ret-paĝaro de la pastro Eichkorn: www.bernhardeichkorn.de ■

***La Kompendio de la Kateĥismo de la Katolika Eklezio mendebla ĉe:***
Sac. Bernhard Eichkorn: kontakt@bernhardeichkorn.de
***aŭ***
https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9845

## Humuro de Makso




Estimata sinjoro paroĥestro, higiena kontrolo pri Kovim-19!
Kie vi lavas viajn manojn antaŭ pekabsolvo?

Ilustraĵo de Jan Heralecký

## MI ESTAS DAŬRE KUN VI

### Spite de persekuto kaj sufero ne perdu esperon kaj paciencon

Ankaŭ ni, kristanoj, estas tentataj atendi nian feliĉon en bonaj vivkondiĉoj: sano, vivnivelo, rekono... Sed Jesuo al ni antaŭdiris malfacilaĵojn kaj batalon. Sed Li donis al ni ankaŭ promeson: „Mi estas kun vi ĉiujn tagojn ĝis la maturiĝo de la mondaĝo.“ (Mat 28,20)




Antaŭ nelonge mi legis libron pri unu el lastaj maljunuloj en rusa monaĥejo Optina, pri beata Nektarij, kiu tie vivis kiel monaĥo en famo de sankteco kaj poste estis malliberigita. Tio estis en la jaro 1923, en la tempo, kiam eksplodis revolucio kontraŭ eklezio kaj la kredanta rusa popolo travivis sian ege kruelan kulminon. „Ĉu nun alvenas antikristo, ĉu nun alproksimiĝas fino de la mondo?“ – kun tiu deprimdemando sin turnadis la homoj al la beata Nektarij. Ili devis spekti, kiel murditaj estis miloj da monaĥoj kaj pastroj, multaj monaĥejoj estis fermitaj kaj likviditaj kaj la profetaĵoj pri la fino de la mondo multiĝis kiel fungoj post la pluvo.

Kaj kia estis respondo de tiu ĉi sankta viro? „Estas multaj homoj, kiuj okupiĝas pri signoj de la fino de la mondo, sed pri sia propra animo ili ne zorgas. Ja la homo ne bezonas scii tempon de la dua alveno de Kristo. »Viglu kaj preĝu« (Mat 26,41), diras la Savinto. Tio signifas, ke ne estas necese antaŭdiveni la okazontaĵojn. Ĝustatempe al la fidelaj servantoj de Dio estos ĉio anoncita.“


Tiu ĉi respondo de la iluminita viro estas valida same nuntempe kiel tiame. Ni, la homoj, volas scii, kio okazos en estonteco, sed pri la propraj animoj ni ne zorgas...

Kiel tio estas vera! Ĉe multaj piaj kristanoj estas nuntempe disvastigita morna humoro de la mondfino, kiu tiel estas kontraŭdira al la kristana spirito de la espero, la aflikta vivsento, ĉe kiu oni ne konsideras feliĉigan ĉeeston de la Sinjoro.

Kaj kie tiu ĉi malheleco enpenetras hejmon, tie ĝi venenigas la tutan familion, forprenas de la infanoj kuraĝon kaj pli poste ĝi plej ofte estigas reziston, ja eĉ malamon kontraŭ la gepatroj kaj la eklezio. Ĝi estas preskaŭ nekuracebla animmalsano, pri kiu la papo Francisko diras: „Malgajeco estas satana sorĉo, kiu malmoligas kaj amarigas nian koron.“

De la tempo, kiam vivis monaĥo Nektarij, forpasis jam preskaŭ 100 jaroj – kaj Kristo ankoraŭ ne venis. La mondo ekde tiu tempo estis difektita per pluaj revolucioj kaj civitanaj militoj. Eksplodis nova mondmilito. „Misteron de maliceco“, tiun satanan realecon, disvastigas senbride preskaŭ ĉiuj

teknikiloj, tial ĝi okupas pozicion en la tuta mondo en ĉiuj sferoj de la homa, socia kaj politika vivoj. Tutmonde la homoj malestime sin forturnas de Kristo aŭ kontraŭ kristanismo kiel „la plej granda malfeliĉo de la homaro... Kritikanto de la kristanismo ne haltas ankaŭ priskribi la kristanismon kiel abomenindan.“ Tiel skribas Nietzsche en la libro *Der Antichrist*.




Sed ĉi ĉio estas al ni en la Biblio antaŭdirita, por nia konsolo, por nia kuraĝigo, kaj tial ni ne havas kaŭzon por paniko, por pesimismo kaj malkuraĝiga timo, kiujn havas tiuj, kiuj vivas sen espero. Eĉ ne sur unu paĝo de la Biblio estas skribite, ke ni havos ĉi tie surtere komfortan vivon, se ni apartenos al Kristo.

Male estas tie skribite, ke antaŭ ol la tempo proksimiĝos al la fino, la potenco de la satano kreskos, por ke la batalo kontraŭ Kristo (en la socio kaj la eklezio) fortiĝu. Katekismo resumas tre bone kaj koncize, kion la Biblio pri tio diras:

• „Antaŭ alveno de Kristo devas la eklezio trairi finan provon, kiu skuigos kredon de multaj kredantoj.

• La persekutado, kiu akompanas ĝian migradon en la mondo, malkaŝos »misteron de la falseco« en simileco de la religia trompo, alportanta al la homaro ŝajnigan solvon de iliaj problemoj koste de ilia apostatiĝo.

• La plej granda religia trompo estas la trompo de antikristo, tio estas la falsa mesieco, per kiu la homo glorigas sin mem anstataŭ Dio kaj lia Mesio, kiu en la korpo venis.“ (KKE 675)

• „Alveno de glorigita Mesio estas en ĉiu momento de la historio haltigita, ĝis Lin akceptos »tuta Israelo«, kies »parto obstinigis sin« en malkredo rilate al Jesuo.“ (KKE 674)

Tiujn ĉi kvar frazojn ni devas havi senĉese antaŭ la okuloj, ni devas la konformajn lokojn, kiujn prezentas la katekismo, en la Biblio trovi kaj legi. El tio ni devas konkludi, ke la persekutado de la eklezio en la 20-a jarcento kun milionoj da martiroj estis parto de la „fina provo“, sed kio nin ankoraŭ atendas, tio estas al ni kaŝita.

La maljunulo Nektarij sin foje esprimis tiel: „Niaj plej profundaj afliktoj aspektas kiel kula piko en komparo kun malgranda parto de la estonta jarmilo.“

Ke nuntempe (en Okcidento) nur malmultaj kristanoj per la tuta koro aliĝas al la eklezio kiel al la lumo de Kristo kaj al la patrino de nia ĝojo, kaj eĉ al en kaŝiteco ĉeestanta resurektinta Kristo mem, estas la ĉiutaga sperto. Alikaze la paroĥestroj en la vilaĝaj paroĥoj ne nuligus gravan nombron da mesoj en labortagoj, ĉar neniu venas por ilin ĉeesti.

Ke en la tuta mondo sin entrudas spirito de antikristo – la spirito de mensogo, ŝajnigita pieco, malĉeesto de la ĝojo en pensado kaj cerbumado de la homoj, registaroj, teologioj, en multaj partoj de sekularigita popola eklezio – tion povas vidi ĉiu, kiu havas la okulojn. Tiu ĉi spirito de mensogo jam dum jardekoj pere de amaskomunikiloj trovas eniron en ĉiujn hejmojn, ankaŭ en niajn korojn. Ĝi estas enpenetranta ĝis plej flanke situantan afrikan kabanon kaj nebuligas kaj degeneras eĉ „bonajn, piajn kristanojn“, malaktivigas kaj forlogas ilin de la spirito de ĝojo, de la spirito de Jesuo Kristo kaj perceptado de lia feliĉiganta ĉeesto.

Kiom da deprimiĝo kaj rezignacio videbliĝas pere de televidekrano, kiom da opono kontraŭ sankteco, vero, eklezio! Sed kiu volas rezigni senbordan proponon de brilvibranta trompema bildo kaj rezigni la informojn kaj komforton?

Koncerne konvertiĝon de judoj, kiu devas antaŭi alvenon de la Sinjoro en gloro: Kiu iam opinius kiel eblan, ke foje (de la Dua Vatikana Koncilio) okazos interpaciĝema, ja

eĉ amikeca interparolo inter judoj kaj kristanoj, kiu de tiu tempo estas realiganta fare de ĉiuj papoj? Sed tio estas nura komenco de tio, kio antaŭos la gloran alvenon de la Sinjoro.

Pacienco estas ordono de la hodiaŭo, persisto kaj pacienco! Tamen hodiaŭ okazas nekredeblaj aferoj por tiuj, kiuj observas eventojn en la lumo de Kristo.

Tial havu, karaj legantoj, neniujn falsajn esperojn, per kiuj estas kamufladaj faktoj de la Biblio kaj kiuj nin volus forlogi de postulo de Kristo je vigleco kaj preĝo, je fideleco kaj persistemo en la sufero. Prefere memoru pri averto de la sankta Aŭgusteno, kiu devis jam en la 5-a jarcento memorigi al multaj kristanoj, kiuj en angoraj tempoj sin turnis al utopiaj esperoj de la paco kaj gloro: „Se vi estas veraj kristanoj, preparu vin je suferoj en tiu ĉi mondo. Ne esperu je pli bonaj



Sankta Aŭgusteno
*(Sandro Botticelli, 1480)*

kaj pli trankvilaj tempoj. Ne trompu vin. Kion ne promesas al vi evangelio, tion ne promesu al vi mem.“

Sed tion ĉi al ni la evangelio promesas: „Mi estos kun vi ĉiujn tagojn ĝis la maturiĝo de la mondaĝo.“ (Mat 25,20) Ĉiutage, ĉiun horon! Kaj ankaŭ: „Mi venis lumo en la mondon, por ke ĉiu, kiu kredas al mi, ne restadu en mallumo.“ (Joh 12,46) Mi estas via lumo! Se vi kredas, vi ne plu estos en la mallumo de via afliktiĝo kaj malĝojo. Ekpensu: „La kredo ne estas lumo, kiu forigas ĉiun mallumon, sed lumilo, kiu gvidas niajn paŝojn dumnokte, kaj tio sufiĉas por la vojiro.“ (Papo Francisko en la encikliko *Lumen fidei*) Kaj tio sufiĉas por la vojiro – ankaŭ por la via!

Ne postulu aliajn lumojn, kiuj sin montros kiel erarlumetoj kaj enĵetos vin en profundan afliktiĝon. Kaj kio rilatas la estontecon, kion vi vere devas scii, tio estos al vi ĝustatempe anoncita fare de la Spirito de la Sinjoro... „Li parolos ne de si mem, sed kion ajn Li aŭdos, tion Li parolos, kaj Li anoncos al vi venontajn aferojn.“ (Joh 16,13) „Sed gardu vin, por ke viaj koroj ne estu ŝarĝitaj de trosatiĝo kaj ebrieco kaj zorgoj pri vivrimedoj, kaj por ke tiu tago ne venu al vi subite... Sed viglu en ĉiu tempo, preĝante, ke prosperu al vi saviĝi de ĉio, kio okazos, kaj stari antaŭ la Filo de homo.“ (Luk 21,34-36)

Helpu, Patrino, al nia kredo! Malfermu niajn orelojn al la Vorto, por ke ni distingu voĉon de Dio kaj lian vokon... Helpu nin, por ke ni al Li tute fidu, kredu je Lia amo, antaŭ ĉio en momentoj de afliktiĝo kaj kruco... Memorigu al ni: Tiu, kiu kredas, neniam estas sola. Instruu nin, por ke ni rigardu per okuloj de Jesuo, por ke Li estu lumo sur nia vojo. Kaj ke tiu ĉi lumo de la kredo en ni senĉese kresku, ĝis venos tiu tago sen la fino, Jesuo Kristo mem, via Filo, nia Sinjoro! ■

*(Preĝo konklude de la encikliko Lumen fidei)*

***Urs Keusch***
*El VISION 2000 – 5/13*

# LA MIRAKLO ĈE LA RIVERO SEJNO

Antaŭ ol en la jaro 1997 la papo Johano Paŭlo la Dua la sesan fojon apostole vizitis Francion, multaj komentistoj heroldis, ke ĝi estos lia plej malfacila pilgrimo. Ne nur kaŭze de la ĝenerala skeptikismo kaj antaŭvenantaj ĝin protestoj de la kontraŭkatolikaj amaskomunikiloj.

La motivo por tiu ĉi vizito de la Papo el Pollando en Francio estis la solenaĵoj de la 12-aj Mondaj Junulartagoj, kiuj estis organizitaj en Parizo. La Sankta Patro venis tien la 21-an de aŭgusto 1997. Rekte el flughaveno li venis per helikoptero al Esplanade des Invalides, kie bonvenigis lin Jean Tiberi, la urbestro de Parizo. Kiam la papo translokigis sin de tie per la papamobilo al la Elizea Palaco, okazis, ke malgraŭ laborhoroj kaj ripoztempo amasiĝis tie nerekoneblaj homamasoj, kiuj pretigis por Johano Paŭlo la Dua la varman bonvenigon.

„En la tuta sia historio nia ĉefurbo ne vidis tiel multnombran arigon de junularo“ – rimarkigis Jeacques Chirac en sia bonveniga alparolo al la Sankta Patro.

La posttagmeza renkontiĝo kun la posteulo de la sankta Petro sur la Marsaj Kampoj arigis pli ol 600 mil gejunulojn! La apero de Johano Paŭlo la Dua sur podio elvokigis kelkdekminutan ovacion. Sekvonttage sur la hipodromo Longchamp ĉirkaŭ 800 mil gejunuloj partoprenis en la preĝgardado kun la Episkopo de Romo. Dimanĉe la 24-an de aŭgusto 1997, kiam estis la kulminpunkto de la solenaĵo de la 12-aj Mondaj Junulartagoj, la Sankta Patro prezidis la Sanktan Meson sur la hipodromo Longchamp, en kiu partoprenis ĉirkaŭ 1,1 miliono de fideluloj. Tio estis vera „miraklo“ konsiderante la antaŭopinion de la organizantoj, kiuj antaŭvidis ĉirkaŭ 350 milojn da ĉeestantoj.

Mario Agnes, la ĉefredaktoro de „L´Osservatore Romano“ komentante ĉi tiun renkontiĝon, rimarkis, ke „realeco ofte diferenciĝas de antaŭvidaĵoj. Tiel estis ankaŭ ĉifoje: la esperiga indiferenteco kaj malvarmo de Parizo antaŭ la 12-aj Mondaj Tagoj de Junularo transiĝis en ekinteresiĝon kaj entuziasmon. Ili transiĝis en la mirkonsternon, kun kiu Parizo rimarkis, ke ĝi estis rejunigita ne nur per la alveno de pli ol miliono da gejunuloj, sed ankaŭ, kaj precipe-maniere, per la ĉeesto de Johano Paŭlo la Dua





– la homo kun ĉiam juna koro kaj rigardo, la juna danke al kapablo gvidi homojn kaj eventojn al estonteco".



Ĉi tiuj eventoj surprizis gefrancojn mem, el kiuj multaj klopodis pli frue konvinkigadi, kiel foraj de la pensmaniero de Johano Paŭlo la Dua estas la konvinkoj de la tiama junularo.

„Mi havis la eblon konversacii dum ĉi tiuj tagoj kun multaj personoj, kiuj partoprenis en ĉi tiu renkontiĝo – ankaŭ kun homoj, kiuj venis tien tre skeptike orientitaj. Mi tamen trovis neniun, kiu ne estus engaĝita en la etoson de ĉi tiu renkontiĝo en la kredo. Homoj neatendite malkovradis la belecon esti kristanoj" – diris pri la renkontiĝo en Parizo en la jaro 1997 Joseph Ratzinger – la posta papo Benedikto la Deksesa.

En Pollando „la miraklon ĉe la Sejno-rivero" rimarkis eĉ la semajnrevuo „Polityka". En Francio preskaŭ ĉiuj revuoj – sendepende de la politika orientiĝo – abundis per vortoj de ekzaltiĝo. Eĉ la maldekstra kaj kontraŭklerikalisma tagrevuo „Liberation" rimarkis pri „la granda venko de Johano Paŭlo la Dua super Francio". La komunisma gazeto „L´Humanite" asertis rekte, ke „la 12-a Mondrenkontiĝo de Gejunuloj estis nekontraŭiga sukceso, montrigante la grandan bezonon de idealo de la generacio de junularo". „Johano Paŭlo la Dua kiel unu el la plej grandaj atestantoj de la nuntempo bonege respondis al ĉi tiuj bezonoj" – asertis Joseph Vandrisse sur la paĝoj de „Le Figaro". ■

*Sebastian Karczewski*
*El Taggazeto Nasz Dziennik, 18.05.2020*
*esperantigis Stanisław Śmigielski*

## MENSOGO POST MENSOGO

***Mensogo estas la efika ilo de satano. Oni mensogas ĉie, ne nur inter maldekstruloj. Ni havas la duan cirkuladon de informado, do ni devas eklerni aŭtentigi ĉiun informon kaj pensi memstare, samtempe ankaŭ rilate al Evangelio.***

**Mensogo n-ro 1**
**Alkoholo estas por homoj**

Ĉu vere? Alkoholo neniigas la ĉelojn de cerbo, malebligas la ĝustan pensadon, gvidas al psikaj malsanoj kaj psikozoj, malgrandigas inteligentecon, kaŭzas genetikajn ŝanĝojn de la feto kaj kripligas idaron nomatan FAS Feta Alkohola Sindromo (Fetal Alcohol Syndrom), detruas ovĉelon ktp. Ĝi difektas koron, hepaton, kaŭzas kanceron, estas ŝtelisto de pene gajnita salajro. Do, pro kio ĝi estas por homoj?

Satano tiel volas, ĉar li volas la fizikan kaj spiritan morton de homo. Kaj ni ripetas laŭ li en katolikaj informiloj: Alkoholo estas por homoj.

**Mensogo n-ro 2**
**Alkoholo estas por plenkreskuloj**

La menskapto de satano. Oni diras al infanoj, ke al ili estas malpermesate drinki alkoholon, ĉar alkoholo estas nur por plenkreskuloj. Ni inokulas al ili informon, ke kiam ili estos plenkreskaj, ili povos drinki alkoholon. Ni instigas infanojn tosti kun suktrinkaĵoj, por ke ili konu ĉi tiun geston, kaj kiam ili plenkreskiĝos, ili povos proponi ĝin kun vodko. En ĉeesto de infanoj ni proponas tostojn kun vodko kaj ni tion nomas kultura drinkado.




**Mensogo n-ro 3**
**Kultura drinkado**

Ne ekzistas la kultura drinkado. Ĝi estas plua mensogo. Ĉiu drinkado signifas enkonduki tokson en korpon. La kultura drinkado direktas al troigado, kaj pli poste al alkoholismo. Ni ne falas en malsanon tuj. La alkoholismo estas la metabola malsano, elvokita per la drinkado de alkoholo. Ĉe la inklinoj, do la genetika alkoholdependeco, ni fariĝas alkoholuloj. Tiel do estiĝas alkoholuloj kulture drinkantaj, tiel estiĝas infanoj de alkoholuloj aŭ indianoj en Ameriko aŭ eskimoj, kiuj ne posedas iujn enzimojn en korpoj kaj estas do malsanaj post kelkfoja drinkado de alkoholo. Do ni falas en brakumon de la malsano senkonscie, senpripense, kun la instigo aŭ aprobo de familio kaj amikoj, kun obeo al reklamoj de alkoholo, troa ĝia produktado kaj oferto. Satano ŝatas la alkoholan malsanon, kiu deprenas de homoj menson, ĉar per alkoholo li povas nin pli facile regi. Ŝtato ankaŭ ŝatas regi drinkemajn civitanojn, ĉar ili ne ribelas, kiam io malbone okazas en ŝtato. Estas enkondukata limigado de laktproduktado, sed estas nenia limigo por produktado de alkoholo kaj nenia limigo por ĝin vendi. Satano ĝojas, ĉar ĝi rikoltas grandajn fruktojn en perforto, rompitaj familioj, memmortigoj, krimoj kaj akcidentoj.

**Mensogo n-ro 4**
**Estas nenia medikamento kontraŭ alkoholismo**

Tio estas mensogo. Ekzistas sekuraj kuraciloj, konataj en la tradicio de medicina herbaro ekde centoj da jaroj, herbaj farmakologiaj terapioj, kiuj laŭ universitataj esploroj helpas malpligrandigi la trouzon de alkoholo je 90 % kaj regeneracias la korpajn organojn lezitajn per alkoholo.

Kial ni ne scias pri tio? Satano ne volas liberiĝadi de alkoholuloj, ili ja estas lia ilaro, sed ili estas samtempe bonegaj klientoj de la alkohola industrio. Ili fordrinkas la lastan moneron, aŭ eĉ priŝtelos ĝin, por aĉeti alkoholon.



*Ilustraĵo de Jan Steen, 1663*

***La helpa ilo en la batalo kontraŭ alkoholismo estas la radiko de Kudzu. Fare de penado de poloj en Kanado Kudzu Root aperis antaŭ 15 jaroj en apotekoj de Pollando. Sed tion malriĉaj drinkuloj kaj iliaj familioj ne scias. Kiel estas tio ebla, ke ĉi tiun vegetalon eĉ ne rimarkis la plej piaj homoj kaj pastroj? Ili estas alkutimitaj al ekzistanta mensogo, ke alkoholulo devas mem kuraci sin per forta volo kaj ili kredas, ke estas nenia medikamento kontraŭ alkoholismo.*** ■

*Bożena Smółkowska*

*El revuo Michael 80/2015 esperantigis Stanisław Śmigielski*

# DIO ANKAŬ AL VI DIRAS: 'MI ESTAS KUN VI, MI VIN NE FORGESIS!'

***Ĉu povas virino forgesi sian infaneton kaj ne kompati la idon de sia ventro? Eĉ se ŝi forgesus, Mi vin ne forgesos, diras Dio!*** (kp. Jes 49,14-15)

**Ni havas certon, ke dum vivo ni ne estas solaj**

Jam du mil jarojn fortigas nin kristanojn certeco de la kredo, ke por vivo ni ne estas solaj. Mallonge antaŭ sia reveno al la Patro promesis Jesuo al siaj disĉiploj: „Mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo!“ (Mat 28,20). Sed per tio Li tion diris ankaŭ al ĉiuj generacioj de la kredantoj. Ĉar Li vivas kaj estas „la sama hieraŭ, hodiaŭ, kaj ĝis eterneco“ (Heb 13,8). Ĉiu el kredantoj de Kristo povas en si sperti lian fidelon al tiu ĉi promeso; sufiĉas al Li malfermiĝi kun kredo kaj al Li fidi.

**Jesuo nin komprenas de interne**

Jesuo estas kun ni alimaniere ol homoj. Niaj proksimuloj estas kun ni kvazaŭ „de ekstere“. Ili strebas nin kompreni, ĝojigi, doni al ni helpeman manon. Sed Jesuo, kiu restadas en niaj koroj, estas kun ni „de interne“. Tio estas tute alia nivelo kaj kvalito de komunikado, amo kaj helpo. Li ne estas kun ni kiel tiu, kiu nin por momento vizitas kaj esprimante sian kompaton, Li proponas helpon, kaj poste li revenas hejmen ... Jesuo kunigis sian vivon kun ni absolute kaj porĉiame: ni estas en Li kaj Li en ni, do ĉion, kion ni travivas, tion Li travivas kun ni. Li komprenas nin de interne. Tio ja estas niaj zorgoj, afliktoj, niaj malsanoj kaj doloroj, kiujn Li surprenis – kiel promesita Dia servanto, viro de doloro, konanta suferon (kp. Jes 53,3-5).

Vi ne devas timi Lin.
Vi ne devas timi Lin alparoladi.
Vi ne devas timi aŭskulti Lin.
Vi ne devas timi lasi vin de Li gvidi.
Vi ne devas timi esti de Li amata.
Vi ne devas timi Lin ami.
Vi ne devas timi.
Vi ne devas...

*(Laŭ eldonaĵo de Vojtěch Kodet: La krucvojo/liaj vundoj sanigis nin)* ■




ROZARIO

kunpreĝado per ZOOM

POR IKUE, POR PACO EN LA MONDO, POR FINO DE LA PANDEMIO

JE LA 20H (UTC+1)

ĈIU SABATE; LA 1-AN TAGON DE LA MONATO; JE LA TAGO DE GRAVA EKLEZIA FESTO

aliĝo:
ikue.reto@gmail.com

## ĈU JESUO ALPORTIS „PARADIZON SUR LA TERON“?

***„La tempo jam plenumiĝis, kaj la regno de Dio alproksimiĝis; pentu, kaj kredu al la evangelio.“*** *(Mar 1,15)*

Se ni kredas, ke la Dia vorto daŭras kaj plenumiĝas transe de tempo kaj ankaŭ en niaj vivoj, tiam sonas la hodiaŭa versiklo iom provokece. Plimulto el ni verŝajne lastatempe ne estas tro ĝojemaj. Ni estas deprimitaj kaj teditaj per longedaŭra malfacila situacio en nia lando kaj en la mondo. La Kovim-19 iafoje renversis inverse niajn vivojn, rilatojn, vivrimedojn, certecojn...


Kiam Jesuo anoncas regadon de justeco kaj paco, malvenkon de malsanoj, malbono, malamo kaj morto..., ni ĉirkaŭ ni vidas veran malon.

Sed kiel tio tiam aspektis, kiam Jesuo venis kaj anoncadis ekregon de la Dia regado? Eĉ tiam ne alvenis „la paradizo sur la tero“. Malgraŭ tio Jesuo per sia povo atestis pri tio, ke lia regado estas pli forta ol kiu ajn malbono. Li liberigadis, resanigadis, redonis vivon kaj esperon tie, kie regis morto kaj timo, Li eniĝadis en homan mizeron. Eĉ hodiaŭ ni povas proprigi al ni tiun ĉi versiklon. Dio anoncas, ke plenumiĝis tempo. Ke ĝi estas proksime. Lia savanta ĉeesto estas proksime al ĉiu el ni.

Eble ni rifuzetas tion ekkredi. Ĉu tio vere validas ankaŭ por mi? Mi ja nenion tian sentas. Kiel mi povas sperti ekregon de la Dia regado en tiu ĉi tempo?

Sed Jesuo ankoraŭ aldiras: „Pentu kaj kredu!“

„Penti“ povas ŝajni al ni esti pretenda, superanta niajn fortojn. Sed esence tio signifas „turni“ sian rigardon „supren“ al Dio kaj „deturni“ sian rigardon de skeptiko, kiu regas nin kaj kiu asertas, ke Dio estas malproksime, ke lia amo nin ne atingos. Kaj anstataŭ skeptiko rigardi al Dio. Kaj tiun poste inviti en ĉiujn cirkonstancojn de la vivo: Sinjoro, venu kun via potenco!



„Ekkredi“ signifas transdonadi al Dio ne nur nian timon, sed ankaŭ niajn imagojn, kiel lia regado devus en nia vivo, en la mondo aspekti. Kiam ni tion faros, certe Dio ne forprenos ĉion malfacilan, kun kio ni interbatiĝas. Per mansvingo Li ne forigos ĉion, kion ni kiel pekemaj homoj malbonigis. Ni plu devos batali kontraŭ konsekvencoj de niaj malbonaj decidoj, kontraŭ nia timo kaj skeptiko, kontraŭ duboj... sed la malbono perdos sian fatale pereigan povon.

Tial ni ekstaru konfide al la Dia vorto, ke en ĉion alvenas Sinjoro kun sia potenco. Poste ni povos sperti, ke Dio batalas niaflanke, iam potence, alifoje per silenta ĉeesto aŭ per plimalpezigado de niaj ŝarĝoj. Kaj spite de la ekstera ŝajno Li nian vivon kondukas al fina venko.

„La tempo plenumiĝis“, sonas post du mil jaroj ankaŭ por ni. La Dia regno, eĉ se kaŝite, alvenas. Ĝi estas ĉeestanta eĉ nun kaj ĉi tie. Pentu kaj kredu al la evangelio!

Venu, Sinjoro! ■

*Ova: www.vira.cz*

# KIAM INTELEKTO RENKONTIĜAS KUN KREDO

***Kiel unu el la plej konataj paroj en la intelekta vivo de la dudekjarcenta Francio trairis el agnostikismo al katolikismo.***

Parizo, la jaro 1903. En la parko Jardin des Plantes, la ŝatata loko por promenoj de parizanoj, promenas juna paro. Junulo estas dudekunu-jaraĝa, la junulino dudek-jara. Diference de la plimultaj senzorgaj promenantoj ili havas koncentritajn vizaĝesprimojn. Ĉagrenigas ilin la temo de la plej alta signifo. Ili deziras ekkoni veron, kaj tamen la natur- kaj filozofia studado, kiun ili partoprenis en la Sorbonne-Universitato, ne proksimigas ilin al tio. Ili serĉas la veron pri senco kaj celo de la vivo, sed je neniu el ĉi tiuj demandoj ili trovas respondojn, kvankam scienco promesas prilumigon de ĉiuj kaŝejoj de la homa ekzistado.


Ŝi post jaroj rememorigas sian staton: „Mi ne volis partopreni en ĉi tiu komedio, mi konsentus por la vivo plena de turmentoj“. Tiutage ŝi diris al li: „Se ni devas rezigni trovi iun ajn sencon de la vorto »vero«, la diferencon inter bono kaj malbono, inter justeco kaj maljusteco, ni ne plu povas vivi homkutime“.



Antaŭ ol ili eliris el Jardin des Plantes, ili ĵuris. Ili donis al sin unu jaron. Se ili ne trovos la sencon de la vivo, ili memmortigos sin. Ilin ne kontentigis iluzioj: „Ni ne volis akcepti iujn ajn maskojn el manoj de plenkreskuloj, esti endormigitaj en iluzia sento de sekureco“. Ilin interesis nur vero. Se ni ne povus vivi en la vero, ni volis morti. Deciditaj, ili forlasis la parizan parkon.

Ŝi mortis en la jaro 1960 en la aĝo de 77 jaroj; li en la jaro 1973 ĝisvivinte 91 jarojn. Ili ambaŭ forlasis ĉi tiun mondon kiel fidelaj infanoj de la Katolika Eklezio.

**La renkontiĝo kun Henri Bergson**



*Henri Bergson*

Ili interkonatiĝis en la jaro 1901 en la Sorbonne-Universitato. Raissa Umanceva estis filino de judaj elmigrintoj. Jacques Maritain – la filo de la riĉa protestanta franca familio. Pri religio ili tute ne interesiĝis. Veron – konkorde kun la spirito de ilia erao – ili serĉis en scienco. Kunigis ilin la pasio ekkonadi, pere de kio ili strebadis ekkoni respondojn al la plej gravaj ekzistadismaj demandoj okupiĝantaj la homan menson. Por filozofiaj disputoj ili ricevadis temojn pri la vivo kaj la morto, kaj ne nur iujn intelektajn ludetojn.

Ŝlositaj en la malbenita cirklo, ili ne estis kapablaj trovi sencon, kiu transpaŝus ilin mem. Turmentis ilin la absuredco de la estaĵo, kiun ili rimarkis sub la supraĵo de fenomenoj. Serĉante ĝeneralajn kaj universalajn aksiomojn, ili samtempe serĉadis la sencon de la propra vivo. Ili estis tiomgrade determinigitaj kaj honestaj, ke ili estis pretaj sekvi la veron, eĉ se ĝi gvidus ilin tien, kie ili ĝin neniam atendus.

La turnpunkto en ilia vivo estis la lekcioj de Henri Bergson pri novplatonismo. La vortoj de la estonta laŭreato de la beletra Nobel-premio pri transcendento „Absoluto, la plej alta Esto“, reflektiĝantaj de la firmamentoj


de la universitata prelegejo, estis por ili kiel la revelacio. Tiamaniere oni ne parolis en altlernejoj de la laika Francio. Danke al Bergson ili malkovris, ke la materia mondo, la mondo de la fizikaj okazintaĵoj, ne elĉerpigas la tutan rea-



*Jacques Maritain*

lecon. Tiamaniere ili apertiĝis al la materia kaj spirita dimensio de vivo. Post la reveno hejmen ili komencis studi Platonon. Tio estis kiel la gluto da freŝa aero en la mucida ĉambro. Baldaŭ pli poste Jacques kaj Raissa geedziĝis.

### La renkontiĝo kun Léon Bloy



*Léon Bloy*

Tiel komenciĝis ilia vojo al kristanismo, kies laŭvica parto estis la renkontiĝo kun unu el la plej konataj verkistoj de la tiama Francio – Léon Bloy, la katolika pamfletisto, vipanta senkompate per sia plumo samgrade la pompajn kaj orgojlajn ateistojn, kiel ankaŭ la varmetajn en kredo, salonajn pastrojn. Tiujn lastajn, postsigne de la paŝtistino el La Salette – Melania Calvat, li kuraĝis nomi kloakoj de malpuraĵoj. Lia verkado elvokis grandan influon interalie ĉe tiaj plumhomoj, kiel estis Karl Huysmans, Paul Verlaine aŭ Georges Bernanos.

Gesinjoroj Maritain, fascinigitaj per lia libro, sendis al li leteron kun la admirvortoj, kaj sekve de tio li ilin invitis. Ili estis mirigitaj, kiel li loĝas tre modeste, signifgrade pli malnoble de sia stato. Tio estis, kiel li mem diris, malriĉeco elektita, fiera kaj plena da nobleco. Li ne klopodis pri riĉaĵoj, kaj en siaj tekstoj li hontmarkigis avidecon de profito kaj la postkuron je mono. Ĉiam li sin starigadis al la flanko de malriĉuloj kaj socie malbone dotitaj, kvankam li neniam estis revoluciulo. Li rekte nomadis sin almozulo, rekonigante, ke tio estas la ontologia homstato.

En lia domo junaj geedzoj trovis la oazon de trankvilo kaj harmonio. Ili povis tie renkonti unuafoje en la vivo klerajn homojn, kaj samtempe kredantajn, akordigintajn intelekton kun kredo.Tio estis por ili la malkovro. La mastro rakontis al ili kiel kompreneblon, ke la ununure grava temo en la vivo estas la strebado al sankteco, kaj unu Patronia recitita por la dekadencigita almozulo estas pli valora ol ĉiuj verkoj kreitaj fare de artistoj en nia terglobo.

Bloy inversis ilian mondon. Ili direktis al li multajn demandojn, kaj li je ĉiuj trankvile, logike kaj precize respondis. Tio puŝigis ilin al la studado de la katolika teologio kaj al historio de la Eklezio. Unuflanke ilin interesis la kristana kredo kun la vizio de la amanta Dio en la centro, kaj aliflanke malpuŝigis ilin la historio de kristanismo plena de deliktoj, pekoj, kaj eĉ krimfaroj de fideluloj. Ili ne scipovis konsenti unu kun la alia. Ili preĝis: Dio, se Vi ekzistas kaj Vi estas la vero, faru, por ke ni eksciu pri tio. Longe daŭris antaŭ ol ili malkovris, ke kvankam Eklezio enestiĝadis en sin mem la plenecon da vero, ĝiaj membroj per sia konduto povis esprimadi la kontraŭateston de la kredo. La ekzemplo de Léon Bloy kaj de liaj amikoj ilin konvinkis, ke estas ebla fideleco al ordonoj de Jesuo en la ĉiutaga vivo.

Fine ili petis la bapton. Dum la preparoj, en la periodo de katekizado, alvenadis al ili la statoj de malvolontiĝo, laciĝo kaj la sento de nefekundeco. Ili tion akceptadis kiel atakojn de diablo, volanta malvolontigi ilin akcepti la bapto-sakramenton. Kiam ili akceptis la bapton, ĉiuj duboj kaj zorgoj dum unu momento malaperis. Venis ĝojo kaj animtrankvilo. Estis tio en la jaro 1906 – tri jarojn post la memorinda promenado en Jardin des Plantes.

### La renkontiĝo kun Akvinano

Unu jaron pli poste la geedzoj translokiĝis Germanujon, kie Jacques daŭrigis la studojn en la Heilderberg-Universitato, prepariĝante por la defendo de la doktora disertaĵo el biologio. Raissa tiam multe malsaniĝadis kaj kuŝadis hejme, do ŝia spirita estro, dominikano frato Humberto Clerissac, ordonis al ŝi la legaĵon de la sankta Tomaso de Akvino. Kiam ŝi komencis legi Teologian Sumoon, ŝi ne povis de ĝi foriĝi. Per sia entuziasmo ŝi influis la edzon. Gesinjoroj Maritain malkovris klerecon, precizecon kaj logikecon de la filozofiaj instruoj de la Akvinano, ĉe kiu la konceptoj de tiamaj universitataj famuloj okazigadis esti malklaraj, konfuzaj kaj nelogikaj. La Anĝela Doktoro estiĝis por ili kiel la ekzemplo de la harmonia ligo de intelekto, kredo kaj la mistika vivo.


*S-ta Tomaso de Akvino*

Jacques decidis forĵeti natursciencojn pro filozofio kaj reale pro tomismo. Dum plia tempo li estiĝis ne nur la renoviganto de la tomisma ideo en la 20-a jarcento, sed ankaŭ unu el la plej konataj kaj influantaj kristanaj pensuloj en la mondo. Ŝi laŭvice publikigadis la mistikajn poeziaĵojn kaj filozofiajn disertaciojn. Ili akiris la statuson de unu el la plej konataj geedzaj paroj en la intelekta vivo de Francujo. Danke al ilia baptopatro Leo Bloy ili malkovris spiritecon de La Salette. La revelacio de La Salette, kiu okazis en la jaro1846, kaj ankaŭ la vizito en la Maria-sanktejo konstruita sur la loko de ĉi tiu revelacio, estis por la geedzoj la granda inspiro. Kiel skribis Raissa Maritain: „La okazintaĵoj en La Salette havis en si mem malegaligitan grandecon kaj belecon. La Sankta Virgulino, kiu kun larmoj antaŭvidis la eksterordinarajn turmentojn ĝis nun, diris per la buŝoj de etaj paŝtistetoj Melania Calvat kaj Maksimina Girauda: „De kiam mi suferas por vi“. Kaj tiamaniere li starigas antaŭ ni la temon de suferado de sanktuloj.

La revelacio en La Salette estis por la geedzoj la mesaĝo pri suferado, kiu povas kunestadi kun la stato de feliĉeco. La laŭdinda suferado de Kristo, Maria kaj sanktuloj okazadis kiel la esprimo de la neimagebla amo al homoj. Tio malkovris al ili dimension de la rezigno kaj asketado, kiujn ili praktikadis pli poste en la propra vivo.

Post la konvertiĝo la gesinjoroj Maritain perdis la plimulton de la ĝisnunaj konatuloj, kiuj rekonis, ke la geedzoj permesis sin fulgumi per fanatismo kaj ke ili perfidis la medion de prospero. Ili akiris tamen novajn amikojn, por kiuj ili estis la kred-atestantoj. Ĉar ili praktikis la riĉan amikecan vivon en la medio de la parizaj artistoj kaj intelektuloj, tial ili povis akompanadi la religiajn serĉadojn de la verkistoj kiel ekzemple Charles Peguy, Ernest Psichari, Julien Green, Max Jacob aŭ Jean Cocteau. Multaj konatuloj en malfacilaj momentoj de sia vivo turniĝadis al ili pri helpopeto. Danke al ili iuj el ĉi tiuj kreantoj trovis sian vojon al la Eklezio.

Precipe simbola ekzemplo estis la verkisto Ernest Psichari. Lia prapatro estis Ernest Renan – unu el la plej batalantaj ateistoj en la dua duono de la 19-a jarcento en Francujo. Renan anoncadis, ke jam baldaŭ scienco anstataŭigos religion, ĉar ĝi respondos je ĉiuj demandoj turmentantaj homon, kaj la kristanismo mortos kiel la superstiĉo. Kaj tamen lia nepo trovis la respondon je ĉiuj intervokiĝantaj demandoj ne en la scienco, sed ĝuste en la kristanismo. Estiĝis tio danke al liaj nerivalemaj geamikoj, kiuj iutage en Jardin des Plantes ĵuris al sin mem, ke ili serĉados la veron, ĉar sen ĝi la vivo ne havas la sencon. ■

*Grzegorz Górny*

*El la revuo Polonia Christiana, n-ro 77/2020*
*esperantigis Stanisław Śmigielski*